# El liberecana vidpunkto

3

**2010a novembro**
Gazeto el neantaŭvidebla eldonofteco
Eldonas: Kultura Societo *Interhelpo*


Retpoŝto: interhelpo@gmail.com


Laŭleĝa deponnumero: B-32995-2010


CC BY NC SA


# La ŝtato alvokas nin al la balotujoj

Plian fojon oni esperas el la civitanaro, ke ĝi laŭrajtigu per sia baloto la politikan povon, kiu subpremas ĝin. Oni diros al ni, ke ni realigas la popolan suverecon pere de nia balotilo, oni diros al ni, ke ni elektas tiujn, kiuj je nia nomo regas la sorton de la nacio.

Ni scias tamen, ke la popola suvereco estas ostaĝigita de la politikistoj, kiuj faras kaj malfaras dum kvar jaroj sen atenti pri ni nek eĉ pri siaj porbalotaj promesoj. Ni scias, ke per nia baloto ni liverus alivion al ili kaj fariĝus iliaj kunkulpuloj.

Ni scias tamen, ke la politikistoj, kiujn ni elektas, ne regas. Ke tiuj, kiuj regas estas la IMF kaj la MB, ke la ekonomiajn gvidantojn oni ne lasas elekti al ni. Ni scias, ke per nia baloto, ni partoprenus la farson kaj fariĝus iliaj kunkulpuloj.

Ni scias tamen, ke la ŝtato realigas la povon de koruptaj politikistoj kaj monavidaj kapitalistoj ne pere de la parlamento, sed pere de la polica perforto, de la ekonomia terurismo kaj de la instituciigita mensogo de la amaskomunikiloj. Ni scias, ke per nia baloto, ni helpus trompi nin mem kaj ni fariĝus iliaj kunkulpuloj.

Kaj ni ne balotos ilin. Ni ne balotos ilin, ĉar

Ni mem volas decidi nian estonton kaj ne, ke faros tion profesiaj politikistoj, kiuj, evitantaj ĉian popolan kontrolon, fariĝas niaj ekonomiaj kaj sociaj ekzekutistoj.

Ni mem volas decidi la ekonomian eliron, kiun ni donos al la fiasko, kiun organizis la kapitalistoj kun la kunkulpo de la politikistoj, kiuj nun petas al ni la baloton.

Ni volas disdividi la laboron kaj la riĉaĵojn. Laboru ĉiuj: el la reĝo ĝis la plej kompatinda almozulo kaj estu ĉiu riĉaĵo kaj ĉiuj ekonomiaj rimedoj je dispono de la komunumo.

Unuvorte: ni volas l'abolicion de la ŝtato kaj la starigadon de la rekta demokratio, ni volas la abolicion de la privata proprieto kaj la starigadon de la liberecana komunismo. Tial

- Ne partoprenu la **balotadan farson**. Ne laŭrajtigu viajn ekzekutistojn
- Surstratiĝu por la **rekta demokratio**: la politika povo al la asembleoj
- Surstratiĝu por la **ekonomia memregado**: la produktado sub servo de la popolo kaj ne de la riĉuloj.

# Ĉu eliro por la krizo?

# La anarkiismo

La kapitalismo krizas ekde la komenco de la 20a jarcento. La financa krizo, kies sekvojn ni suferas nune, estas nenio krom manifestaĵo de la mortinta krizo de la sistemo pri ekspluatado de la salajrata laboro. La nuna situacio elmontras plurajn aferojn ĉiam pli kaj pli memvideblaj, kiuj bezonigas seriozan, respondecan kaj engaĝoplenan debaton de la plena socio.

La nuna krizo aranĝeblas nek per la labora reformado, nek per la adoptitaj financaj decidoj, nek per la nuna politiko. La problemo estas ĝisfunda. Nepras temigi entute la kapitalismon kiel sistemon, kiu organizas nian vivon. Memvideble elteni la samajn financajn politikojn kaj permesi al la samaj uloj, kiuj forrabis nin, determinu la ekonomian agendon ne garantias la socian bonfartstaton kaj tutkontraŭe pligandigas la malegalecojn inter la homoj kaj pliakrigas la socian flankenigon kaj la troekspluatadon de la homoj kaj de la natura medio.

Se ni volas havi estonton kiel homaro, ni nepre ŝanĝu nian vojon kaj starigu ion novan inter ĉiuj. Sistemon, kie tio ĉefa estu la respekto al la homoj, kiu garantiu la bonfartstaton al ĉiuj, kiu sinbaziĝu sur la rekta demokratio kaj la plena memregado de la laboro, la rimedoj, la instruado, la sano, la riĉeco... Nur la civitanara partopreno kaj administrado eblas garantii la egalecan disdividon kaj la socian juston. Tamen tiel la ŝtato kaj la politikaj partioj kiel la oficiala sindikatismo klopodas elteni nin for el scenejo de solidareco, interhelpo, kontraŭstaremo kaj ribelemo, kiu permesus al ni bremsi tion, kion ili klopodas kredigi nin neevitebla: la senĉesan retroiron de la rajtoj de la laborista klaso.

Ili volas nin ĉiam pli malriĉajn, ĉiam pli sklavajn. La unuaj per la altrudo de eliro el la tielnomata krizo, kiu sekvigu pli grandan malstablecon de la laborpostenoj, malpli altajn salajrojn, senfendan diktatorecon de la kapitalo kaj vivkondiĉojn similajn al tiuj de la 19a jarcento. La duaj per la elteno de la laborista klaso kaj la entuta socio je la plej grava sendefendeco pere de sia senlima paktemo kaj pere de siaj ŝajnbatalaj tagoj, per kiuj ili klopodas elteni nin ene de la limoj de senfrukta lukto kaj sen transformigaj perspektivoj.

Nun —kun la teknikaj kaj infrastrukturaj rimedoj kaj kun la produktita riĉo— ne estas kompreninda tio, ke la socio ne antaŭeniras respekteme al la personoj kaj la medio. Havas neniun logikon daŭrigi sistemon, kiu sin montris maltaŭga por atingi universalan bonfartstaton kaj kiu nur favoras etan malplimulton, kiu stimulas senfinajn militojn, religiajn alfrontojn, sociajn malegalecojn ktp. La sistemo mem kreas regpensajn meĥanismojn por generi sentojn pri frusto, skeptikismo kaj senkuraĝiĝo.

Pro tio ĉio nepras alvoki la gelaboristaron kaj la tutan socion sin organizi flanke de la ŝtato kaj de ĉiu politika organizaĵo kaj elteni batalon, kiu preteriru izolitan luktotagon —kiel estis la 29a de septembro. Nepras alvoki senĉesan batalon por atingi la nursolan eblan solvon por la krizo: finigi la sistemon de kapitalista ekspluatado kaj starigi novan socion, kiu sinbaziĝu sur la libero, la memorganizo, la justo kaj la interhelpo.

# Ŝtata sindikatismo

La sindikato estas la natura organizformo de la laboristaro. Laŭlonge de la historio de nia klaso la sindikatismo ŝanĝis celojn kaj organizformojn. El la metisindikatoj oni pasis ĝis la unikaj sindikatoj de industribranĉo kaj la federacioj de produktadsektoro, el la defendo de la antikvaj metikorporaciaj prerogativoj ĝis la batalo por konkeri novajn sociajn plibonigojn kaj vivikondiĉojn. Nun la sindikatismo krizas. Kiam oni parolas pri sindikatoj, ŝajnas devige uzi la vortojn 'koruptaĵo' kaj 'perfido'.

La nuna stato de senĉesa krizo de la kapitalista sistemo portis nin al nova situació: la sindikatismo taŭgas jam akiri neniun realan, ĝeneraligeblan kaj permanentan plibonigon de la vivkondiĉoj de la laboristaro sen preterpasi la kapitalisman kadron. Tial la sola reala sindikatismo ebla nun estas sindikatismo, batalanta por nova socio, kiu, superanta la produktadon, kiu celas la atingon de plusvaloro, sinbaziĝu sur la kolektiva proprieto kaj la rekta demokratio.


La malnovaj sindikatoj, kiel CCOO kaj UGT*, ĉar ili rezignis la revolucian alternativon, nur povas survivi kiel administrantoj de la laborforto subserve de la sistemo, tio estas, kiel plia parto de la ŝtato. Tial ili estas devigataj, por daŭrigi sian ekziston kiel organizon kaj *modus vivendi*, pakti ĉiuspecajn reduktojn de la laboristaj rajtoj, bari ĉian bataleman konteston de la laboristoj, aliiĝi al preskaŭoficistoj de la ŝtato. Unuvorte aliiĝi al flavaj sindikatoj.

Ĉi tia sindikatismo neeviteble troviĝas regita de la korupto, de la perfido kaj de la senbremsa paktemo, ĉar tio estas la nursola eblo ekzisti, kiu restas al ili ene de la sistemo. Ni vidas ilin iufoje, kiel dum la teatraĵa ĝenerala striko, kiun ili alvokis la 29an de septembro, klopodante savi la bildon antaŭ la publika opinio. Bonŝance, ĉe tiu ĉi trompo-alvoko la kuglo eliris tra la kolbo: ili klopodis uzi la laboristan koleron por savi sian bildon, sed la rezulto estis, ke la laboristoj uzis tiun ĉi alvokon por esprimi sian koleron surstrate kaj ĉe la entreprenoj —kaj eĉ kontraŭ tiuj ĉi sindikatoj.

La sindikatismo, kiun bezonas nun nia klaso —kaj kiu neniigos la flavan sindikatismon de CCOO kaj UGT—, nepras enhavi tiujn ĉi trajtojn:

- nepre ĝi havu internacian kaj internaciistan karakteron, ĉar tiu ĉi estas la sola kielo alfronti la tutmondiĝintan novliberalismon kaj kontraŭbatali la dispecigon de la klaso, kiun ĝi altrudis al ni kaj kiu faras el la laboristoj de ĉiu lando konkurenculojn por tiuj de ĉiu alia
- nepre ĝi sin regu per la principoj de la rekta demokratio por malebligi la profesiigon de la sindikatistoj kaj sekurigi la kontrolon pri la organizo kaj pri ties decidoj flanke de la aliĝintoj
- ĝi nepre batalu senlace por la reala plibonigo de la vivikondiĉoj de la laboristoj, kio implicas la superadon de la kapitalista sistemo, tio estas, la abolicion de la ŝtato kaj la privata proprieto kaj la starigadon de la rekta demokratio.

* Comisiones Obreras (Laboristaj Komitatoj) kaj Unión General de Trabajadores (Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj), plej grandaj hispanaj sindikatoj.



# Ĉu bonvenon al la teokratio?

Kio pli kare difinas la homon mem estas la libera volo, tio estas, la kapablo preni lian sorton ĉemane kaj decidi pri ties vivo, la socio kaj eĉ la planedo. Ekde la plej praa bruteco ĝis niaj tagoj la homaro antaŭeniris per ampleksigo de siaj libereckampoj, surbaziĝante sur la praktika spertaĵo kaj neniigante la prapatrajn antaŭjuĝojn kaj timojn per la racia penso.

Tamen la restaĵoj de nia malklara pasinto survivas ĉe la religio. La religio per siaj instruoj pri submetiĝo al destino jam antaŭpretigita de la volo de la laŭvica dio, per sia promeso pri alia vivo, repaganta la penojn de la estanta —nur kondiĉe ke oni plenumu iujn ordonojn, kiuj kontraŭas la racion, la sciencan penson kaj la disvolvadon de la libero—, per sia senkondiĉa defendo de la ŝtata povo sur la socio, estas la plej grava intelekta malamiko de la homaro. Tial nepras al ni energie rifuzi ĉiun religion kaj liberigi nin el ĉiu restaĵo de teologia penso, kaŝita en niaj cerboj.

La 7an de novembro vizitas Barcelonon la ŝtatestro de la nursola eŭropa teokratio. La ŝtatestro de Vatikano. Preskaŭ neniu deziras memori pri tio, ke tiu ĉi eta teokratia ŝtato ekzistas pro decido de Benito Mussolini (la itala *Duce*), ĝi estas do ankaŭ la nursola eŭropa lando starigita de la faŝismo. La Blanka Sorĉisto de Vatikano estas el politika kaj ideologia vidpunktoj la tutmonda bildo pri reakcio kaj novkonservemo. Tamen la hispana ŝtato (kaj sia kataluna imitaĵo) pretas elspezi 2,5 milionojn el niaj eŭroj por bonvenigi-homaĝi tiun ĉi mallumegan figuron. Dume estas mono nek por pensioj, nek por senlaborula monhelpo, nek por la publika sansistemo ktp.

Kial la ŝtato favoras tiom la katolikan religion? Ĉu ĝi faros same kun la ĉiureligiaj estroj, kiuj vizitos nian landon? Kial oni sangosoife forĉasas eĉ la plej minimuman disidentecon kaj kontraŭe oni skrupule repektas eĉ la plej skandaloplenajn malindaĵojn, se oni faras ilin je la nomo de iu religio aŭ ili estas faritaj de anoj el iu organizita religio?

Eble ĉar, kiel kantis la maljuna kaj preskaŭ forgesita *payador*,

«¿Que Dios ayuda a los pobres?
tal vez sí o tal vez no,
pero es seguro que almuerza
en la mesa del patrón.»

«Ĉu dio helpas la malriĉulojn?
eble jes aŭ eble ne,
sed certas, ke ĝi frandas
ĉe la tablo de la mastro.»